



Monto Sainte-Victoire (13) je sunsubiro

esperanto

Provence

kvaronjara gazeto de la Provenca Esperanto-Federacio

n° 110 - aŭtuno 2017

federacia retejo

<http://www.esperanto-provence.org>

nia federacio sur Facebook

<http://www.facebook.com/esperantoprovence>

prezidanto

Pierre Oliva

Eden Park n° 99

2772 Montée du Vieux Camp

83330 Le Castellet

06 76 55 57 23

nlpolecamp@gmail.com

baza kotizo por aliĝo

(kun la gazeto) : 6€

ĉeko al :

"Espéranto-Provence"

pere de via loka asocio

aŭ sendota al la **kasisto**

Nicole Lafitte

Eden Park n° 99

2772 Montée du Vieux Camp

83330 Le Castellet

nlpolecamp@gmail.com

sekretario

redaktoro kaj enpaĝiganto

Pascal Vilain

61 Montée du Castelar

83460 Taradeau

06 42 19 68 51

p.vilain83@orange.fr

limdato por sendo de publikotaĵoj por la venonta n°

31-a de decembro 2017

bonvolu sendi al la supra retadreso

><<>

antaŭdankojn pro viaj kontribuajtoj

Vorto de la Prezidanto...

Mi esperas, ke la pasinta somero ebligis al vi efektiviĝi multe da tiuj projektoj, gravaj aŭ ne, kiujn pro manko de tempo ni kutime ne povas plenumi dum la labormonatoj.

Somero estas ja momento por plezuro, amuziĝo, kaj ankaŭ por ripozado, tiom necesa por ke ni, bonvoluloj kiuj zorgas pri niaj asocioj, rekomencu nian agadon en kiel eble plej bonaj kondiĉoj.

Kiel ĉiam, ni bezonas energion kaj forton por sukcesigi nian entreprenon por antaŭenigo de pli justa lingva komunikado.

Kuraĝon kaj amikajn salutojn al vi ĉiuj !

Pierre Oliva

... kaj de la redaktoro

Petit changement pour un grand service

Notre gazette s'améliore, du moins en ce qui concerne la version PDF.

En effet, à partir de ce numéro, quand un lien est donné pour accéder à une page Web, il vous suffit de cliquer sur ce lien pour voir apparaître la page concernée. (Auparavant, il vous fallait le recopier ou le sélectionner-copier-coller pour atteindre le site souhaité.)

J'espère que ce changement vous incitera à ouvrir plus souvent et plus régulièrement les pages que je vous propose.

Nouveau mode d'envoi d'Espéranto-Provence par PDF

Ayant rencontré des difficultés avec mes messageries Orange et Gmail pour l'envoi du PDF de la gazette à une liste d'une centaine de personnes, j'ai choisi un nouveau mode de diffusion : Sendinblue.

Ce numéro est le troisième que vous recevez par ce canal, et il semblerait que quelques difficultés persistent : certains me disent qu'ils n'ont pas reçu le PDF, d'autres qu'ils l'ont trouvé dans la rubrique « indésirables » ou même dans « Promotions » chez Gmail.

Pour moi, Sendinblue a un avantage : il me permet de savoir combien de personnes ont effectivement ouvert le message et donc – j'ose l'espérer ! – lu la gazette.

Avant, par un envoi avec Orange ou Gmail, je n'avais aucun suivi possible.

Maintenant, je sais par exemple que mon message qui vous donnait en pièce jointe le numéro d'été (n° 109 de juillet) a été ouvert par 42 d'entre-vous, sur les 90 destinataires, plus de deux mois après l'envoi.

Je l'adresse aussi à une liste d'amis d'autres régions ainsi qu'aux autres fédérations régionales : sur les 25 destinataires, 12 ont ouvert le message. Au total, donc : 54 sur 115. Dois-je m'en contenter ou le déplorer ?

En tout cas, si vous rencontrez des difficultés dans la réception d'Espéranto-Provence, n'hésitez pas à me le faire savoir.

Pascal Vilain

Venontaj staĝoj

Aldone al tiu-ĉi gazeto, vi ricevis ankaŭ aliĝilojn por la staĝoj novembra en **Le Beausset** kaj marta en **Les Issambres**. La respondeculoj, kiuj denove preparis por vi kompletajn kurs- kaj distradprogramojn, esperas, ke vi multnombre aliĝos al unu aŭ eĉ ambaŭ eventoj.

Bonvolu ne atendi la lastan momenton por via aliĝo ; tio multe helpas kaj kontentigos la organizantojn.

Septembraj forumoj de asocioj

- **Fréjus** : la 3-an

Carmen S.
varbas
preterpasantojn
al Eo



- **Manosque** : la 9-an en *Parc de Drouille*

- **Marseille** : la 10-an

«Vivacité», la Marsejla forumo de asocioj, okazis la 10-an de septembro en Parko *Borely*. Multaj inter la regionaj esperantistoj venis kaj deĵoris je nia budo. Tiu ega ĉeesto ebligis al ni zorgi pri pluraj vizitantoj samtempe. Krome, ni ankaŭ povis forlasi nian budon por viziti aliajn en la foiro, kaj prezenti Esperanton al ili.



Ni akceptis multajn vizitantojn kaj prezentis Esperanton al ĉiuj. Kompreneble ni konstatis, kiel kutime, ke la maljunuloj jam aŭdis pri Esperanto dum la malkovro de la internacia lingvo estas novaĵo por junuloj. Krome, ni notis ke la plej bona momento estas la mateno.

La matenvizitantoj de la evento estas ĝenerale serioze interesataj de la aktivaĵoj de la diversaj asocioj, kiam la posttagmezaj vizitantoj estas pli ofte promenantoj. Ni atingis ekzakte la saman nombron de kontaktoj kiel en la pasinta jaro. Nun, ni povas esperi, ke multaj el tiuj kontaktitoj iĝos novaj lernantoj !

Speciala danko al *Chantal, Pierre, Marko kaj Viktor*, kiuj deĵoris dum la plej granda parto de la tago. Mi dankas ankaŭ *Jana, Michel kaj Monique...* kaj *Flavie*, kiu vizitis kaj subtenis nin !

Nun, ni povas jam prepari la forumon de la venonta jaro!

raportis Thierry S.



Ili jam aliĝis al Amikumu.

Ĉu ankaŭ vi ?

Se ne, vidu ĉi tie pri kio temas :

<https://amikumu.com/fr>



Someraj renkontiĝoj

De la komenco de julio ĝis la fino de aŭgusto, plejofte letargias la Esperanto-kluboj ; estas ja tempo por somerdormado. Sed por aktive uzi nian ŝatatan lingvon, restas staĝoj, renkontiĝoj, kongresoj... Ĉisomere, kelkaj Provencanoj havis la okazon vivi en Esperantio ekster niaj region- kaj landlimoj :

- *Maria kaj Christian Castillon*, el *Pignans* (83), partoprenis en la **102-a Universala Kongreso** en **Seulo. (Koreio)**. Ĉu eble aliaj el nia regiono ?



- *Alain Rémy*, el *Toulon* (83), biciklis tra **10 Eŭropaj landoj**, tiel uzante la forton de siaj gambaj kaj abdomenaj muskoloj laŭlonge de la 9 500 traveturitaj kilometroj.

Kompreneble, ankaŭ por li oftis la kontaktoj kun lokaj esperantistoj. *Alain* estis eĉ intervjuita en Kievo (Ukrainio) de *Vladimir Soroka*, el "EKO-Kultura-Tutmonda movado".

Eblas spekti la intervjuon ĉi tie :

<https://youtu.be/TC6oOy7SE5U>



*Pavlina,
Alain
kaj Vladimir*

- *Thierry Spanjaard*, el *Marseille* (13), vojaĝis tra **Centra-Azio (Kazaĥio, Uzbekio...)**, kie li havis interesajn kontaktojn kun la loka esperantistaro.



Thierry en Samarkando (Uzbekio) kun Anatoli Ionesov, kreinto de la Esperanta asocio kaj de la Muzeo pri Paco kaj Solidareco

En Bjalistoko (Pollando), la 26-an de julio, Esperanto-tago kun Elzbieta Karczewska, prezidanto de la loka Eo-klubo



- *Monique kaj Laurent Prezioso*, el *Saint-Raphaël* (83), restis nialande kaj renkontiĝis kun pluraj samideanoj el **Châtel-Guyon (Aŭvernjo)**.



... kaj kun Vyacheslav Nasretidinov en Almaty (Kazaĥio)



- *Nicole Lafitte kaj Pierre Oliva, el Le Beausset (83), partoprenis en la 21-a Internacia Renkontiĝo en Plouézec (Bretonio).*

Ni estis la nuraj Provencaj partoprenantoj. Okazis kursoj, kaj ekskursoj por malkovri la regionon. Estis ankaŭ proponitaj al junuloj kaj plenkreskuloj jogo, poezio, teatro, kantado, komputilado, tablo-ludado, tradiciaj dancoj kaj prelego pri Pollando. Ĉijare, ses esperantistinoj, anoj de «*Centre d'Éducation Interculturelle de Wrocław*» (Pollando) estis invitataj por instrui kun 12 aliaj instruistoj kaj spertaj animantoj. Malfrue, «Gufujo» akceptis la «noktobirdojn».



Ni partoprenis en du kursoj pri bablado. Unua kurso : *Teresa Sibilak kaj Laurent Puech* aktive instruis ; ĉiuj partoprenantoj devis aŭskulti, demandi, paroli, skribi, respondi... pere de ludoj, priskriboj, eltrovoj de tekstoj. Sekvis kolektivaj korektoj kaj komentoj.

- *Roselyne Favier, el Morières-les-Avignon (84), partoprenis en la «Festa Semajno por infanoj kaj familioj», en la Kastelo Greziljono (Baugé-en-Anjou).*

Mi estis tie kun mia nepino de la 5-a ĝis la 13-a de aŭgusto. Mi opiniis, ke estas momento, por ke ŝi konatiĝu iomete pli kun Esperanto. Ŝi estas okjara ; mi ne scias, ĉu ŝi volos (aŭ povos) poste lerni nian lingvon. Mi agrable surpriziĝis : ŝi ne volis alveni tro malfrue al la kursoj... La duan tagon matene, ŝi rapide vekigiĝis... Por ŝia nivelo, *Nicky Janssen*, Flandra instruantino, uzis la metodon «*Mazi en Gondolando*» kaj plurajn manludojn. Posttagmeze, ludoj aŭ origamio estis proponitaj.



Dua kurso : *Małgosia Komarnicka* proponis la temon : «*Ekkonu mian landon pere de ĝia legendo*». Fakte, ni komparis diversajn legendojn ; ofte ili estas preskaŭ samaj en diversaj landoj. Finfine, kolektive, ni elpensis la nian : «*Gufuja legendo*». Sciu, ke *Małgosia* skribas multajn artikolojn en Esperantaj revuoj, precipe en «*Juna Amiko*».



En ateliero kaj vespera programero, *Lidia Ligęza* konatigis al ni poemojn de la plej eminentaj Esperantaj verkistoj. Tre interesa estis la komputila ateliero «*Vikipedio*» de *Pierre Cardona* : riĉigi, eĉ ete, la retan enciklopedion, por ne kontentigi sin per nura uzado ; plue, kompreni kaj uzi plej bone la plurajn aspektojn de Vikipedio, kiuj ne limiĝas je nura enciklopedio. Dank' al *Izabel kaj Damien*, ĉiutage, infanoj kaj plenkreskuloj povis ĝoje malkovri diversajn manierojn por protekti la Teron, la aliajn homojn kaj sin mem. Kia bela memoraĵo !

raportis Nicole kaj Pierre

Vespere, la infanoj povis elekti rakontojn aŭ liberan tempon. Malfeliĉe, la vetero estis tre malbela dum tri tagoj...

La infanoj komprenas kaj kelkaj parolas Esperanton. Mia nepino, post kelkaj tagoj, diris al mi, ke ŝi preskaŭ ĉion komprenis, kiam la patrino de du knaboj alparolis ilin. (kroata patrino, rozkolora vestita)



Por la plenkreskuloj, diversaj kursoj estis programitaj. Mi estis kun *Jean-Luc Kristos*, kiu instruis al ni la historion de Esperanto, ĉefe la periodojn de la du mondmilitoj. Ni ankaŭ ludis. Kompreneble, li neniam parolis france. Mi multe ŝatis tiujn kursojn.

La vivo en la kastelo estas agrabla : promenadoj, kantoj, muzikoj... kaj ankaŭ la komunaj preparadoj, aranĝoj... Kelkaj partoprenis, aliaj komforte sidis !

Mi ne bone scias, ĉu mi deziras partopreni denove en Greziljonaj staĝoj.

Pri tiu semajno, se vi deziras aliajn klarigojn, petu ilin de mi.

raportis Roselyne F.

Ankaŭ niaregione okazis Esperantaj renkontiĝoj. Se vi ne iras al Esperantio, ĝi foje venas al vi...

Vizito de Hungarino kaj Poloj en *La Ciotat*

Ne mankas turistoj en somero sed tiu triopo estas elstaraj esperantistoj.

Ilona Koutny (el Hungario, lernantino de la fama lingvisto *Istvan Szerdahelyi*) estras la katedron pri interlingvistiko kaj Esperanto en la universitato de *Poznan* kaj ŝi provis instigi la homojn sekvi perkoresponde kaj fizike la trijaran kurson en *Poznan* (Pollando).

La pola paro, **Maria** kaj **Janusz**, loĝas en *Torun*, kie ŝi estras la etnografian muzeon dum li laboris en *Gdansk*. Sekve ne mankis al ili intereso por la estinta ŝipkonstruejo kaj la regiona muzeo en *La Ciotat*. Ne parolante pri la maro, la Verda insulo kaj la fjordeto *Figueroles*.

Ili venis al *La Ciotat* post restado en Alpoj ĉe *Monique Arnaud* kaj posta vizito al *Aix* ĉe *Arlette Duc-Goninaz*.



En *La Ciotat* okazis pikniko la 10-an de julio dum estis preparolata la ekonomia situacio en Pollando. *Maria* agnoskis, ke ĝenerale la homoj vivas ege pli bone ol dum socialista periodo (libereco vojaĝi, plenplenaj vendejoj) kaj dank' al Eŭropa Unio estis rekonstruitaj vojoj ks. Sed la homoj forgesis kaj estas nacia tendenco sekvi la britojn. Tiam por Pollando verŝajne denove ekestus dispartigo kaj malapero de la lando...

raportis Renée Triolle

Aliaj okazintaĵoj ekster Esperantio

- *Monique Arnaud*, el *Bénévent-et-Charbillac* (05) partoprenis en la **20-a Pac-Festo** en *Gap - Domaine de Charance* (05), la 2-an de julio.



C'est un tout petit stand à côté de celui de l'AFPS (Association France-Palestine-Solidarité) et les visiteurs visitent l'un et l'autre ! Toujours des personnes intéressées mais pas au point de se mettre à l'apprentissage de la langue.

Seul élément positif : ces personnes sont contentes de voir que l'espéranto existe toujours. Faut-il en déduire un manque de visibilité le reste de l'année ? On peut aussi se réjouir d'être présent !

- *Monique* partoprenis ankaŭ en la **"Foire Bio Génépi"** en *Embrun* (05), la 9-an kaj 10-an de septembro.



... kaj en **"Alp'ternatives"** en *Rambaud* (05), la 23-an de septembro.



Edwy Plenel, fondateur de Mediapart, y était présent, et sa venue pour parler de la liberté de la presse a attiré beaucoup de monde. Notre stand a vu passer un public intéressé mais le temps de présentation a été plutôt court. Jean-Pierre, sympathisant, a bien voulu prêter main forte pour tenir le stand. Notre champ d'action s'élargit un peu !

pri la tri eventoj raportis Monika A.

Omaĝo al Honoré Bourguignon

En la numero 107 de nia gazeto, je paĝo 7 - rubriko "ZEO-oj en PACA > 4 - Callian (83)" - vi povis legi pri *Honoré Bourguignon*, lernejestro kaj esperantisto, arestita de la nazioj fine de la Dua mondmilito kaj mortigita en *Dachau*.

Ĉiujare, la 14-an de aŭgusto, okazas en *Callian* omaĝo al S-ro *Bourguignon*.

Invitita de la urbaj instancoj, kune kun *Mari-Roza* kaj mia frato, prezidinto de la Dunkirka Eo-asocio, mi ĉeestis la eventon.

Ni tiam povis konatiĝi kun la filo kaj nepo de *Honoré Bourguignon*.



Lucien Bourguignon, dekstre, parolas pri sia patro.

Lucien, la filo, rakontis mikrofone antaŭ la publiko la jenan anekdoton :

"Mon père est arrêté le 10 juillet 1944, interné à Nice. Le 15 août, jour du débarquement, les Allemands libèrent une partie des prisonniers considérés comme "du menu fretin" et emmènent avec eux 13 prisonniers, parmi lesquels mon père. [...] Le car qui va les mener vers l'Allemagne au départ de Nice fait une première halte à Gênes. Les 13 prisonniers sont internés dans une prison de cette ville et mon père a comme voisin la personne près de qui il était assis dans le car. Il ne trouve alors rien de mieux à faire que de proposer à ce codétenu une première leçon d'espéranto. Les faits sont avérés, ils se trouvent dans une brochure où ce monsieur a écrit les souvenirs de son séjour dans le camp de *Dachau*."

En la gazeto n° 107, mi donis ligon pri verko de *Lucien Bourguignon* : "*Honoré Bourguignon, IAREV-ano*". Sed la ligo ne plu validas.

Jen do alia, se vi volas legi la eseon :

<http://satesperanto.org/spip.php?rubrique15>

Mi ankaŭ trovis multe da artikoloj de S-ro *Bourguignon*, aperintaj en "*L'Edicateur Prolétarien*".

Jen du ligoj, sed vi povos trovi plurajn aliajn.

<https://www.icem-pedagogie-freinet.org/node/44802>

<https://www.icem-pedagogie-freinet.org/node/39004>

raportis Pascal V.

Ekspozicio "Voyage et Espéranto" en Le Beausset (83)



La inaŭguro okazis en Pôle Saint-Exupéry la 8-an de septembro



Var-Matin, 2017/09/12

Paĝo de la komencantoj

suite du numéro 109 :

document élaboré par un groupe de travail de la Ligue Internationale des Enseignants Espérantistes (ILEI) pour homogénéiser la terminologie concernant l'enseignement.

Kie oni lernas ?

- en ŝtata lernejo = *établissement public*
- en ne-ŝtata lernejo = *établissement privé, religieux, etc.*
- per eksterlerneja instruado = *par enseignement extrascolaire*

- en klasoĉambro = *dans une classe*
- en lerncela faka loko = *dans une classe spécialisée, par ex. pour la chimie, la cuisine...*
- en sportejo = *en salle de sports*

Kiel oni lernas ?

- klaso (lernanta grupo, lernantaro) = *classe, ensemble d'élèves*
- hejma instruado = *enseignement à la maison*
- klasa instruado = *enseignement en classe*
- fora instruado (per teknikaj iloj diversaj, perkoresponde, k.s.) = *enseignement à distance (ex. par correspondance)*
- alterna instruado (parte en lernejo, parte en entrepreno) = *enseignement en alternance (école/entreprise)*

vortenigmo

trouvez un mot de 5 lettres composé de trois parties suggérées par l'illustration, auxquelles vous ajouterez la finale -o des noms.



Plurelekta demandaro
laŭ verkoj de Robert Llorens eldonitaj de Esperanto-Info

1 - gramatika

- a) vi estas ? Mi estas tie.
1 - kia ; 2 - kiu ; 3 - kie
- b) vi iras ? Mi iras tien.
1 - kian ; 2 - kiun ; 3 - kien
- c) Ju pli longa laboro, granda plezuro.
1 - ju pli ; 2 - des pli ; 3 - neniu

2 - vorto-trezora

- ĉ) elektu "apliko", "diligenteco" aŭ "surmeto" por traduki la francan "application"
- 1 - d'une loi :
- 2 - d'esprit :
- 3 - d'une chose sur l'autre :
- d) elektu "atentinda", "ŝatinda" aŭ "taksebla" por traduki la francan "appréciable"
- 1 - peut être évalué :
- 2 - digne d'estimation :
- 3 - important :



Superzam'
proponita de Jean-François Cousineau

1. En kiu urbo okazis la unua Universala Kongreso ?
a- Parizo b- Bulonjo-ĉe-Marzo c- Kalezo
2. Kiu el la jenaj verkoj de Baghy estas teatraĵo ?
a- Preter la vivo b- Songô sub pomarbo c- La teatra korbo
3. Kiu flutis ĉe la origina Kajto ?
a- Marian b- Marita c- Nanne
4. En kiu jaro edziĝis Zamenhof ?
a- 1887 b- 1889 c- neniam
5. Kiu korelativa finaĵo signas lokon ?
a- am b- e c- al
6. Kiu estas la plej longa rivero en Afriko, krom Nilo ?
a- Kongo b- Niĝero c- Zambezo

Plurelekta demandaro

1 - gramatika

a : 1 ; b : 2 ; 3 : 1

2 - vorto-trezora

ĉ1 : maljuna ; ĉ2 : malnova ; ĉ3 : eksa
d1 : voko ; d2 : alvoko ; d3 : apelacio

**Solvoj de la demandoj
en EP 109
somero 2017**

Superzam'

1 c > 1905 ; 2 b > Viktimo
3 c > Marian
4 a > instuisto ; 5 c > en
6 b > Misuro (4 090 km)



El la mesaĝkesto de la legantaro

Philippe Combot

pri la numero 109

p. 5 > « nous sommes repartis avec la satisfaction de se dire » = chacun est reparti avec la satisfaction de se dire

p. 8 > « kampajn-rimedoj »

probable devus esti : « kampanjo-rimedoj »

respondo de la red.

En la numero 108, mi ŝajne sukcesis forpeli ĉiujn korbulojn. Ĉifoje ne... peĉ !

Martine Demouy

Dankon, Pascal, ni nun estas en Koreio, ĉe ILEI-kongreso.

respondo de la red.

Mirinda maŝinmondo, ĉu ne ? Danke al Interreto, nia gazeto flugis al Sud-Koreio. Cetere, Martine sendis poste belan bildraporton pri la 50-a ILEI-kongreso kaj pri Busano, la kongresloko en Koreio. Dankegon al vi, Martine !

Se vi volas vidi la raporton, jen la ligo :

<https://1drv.ms/b/s!Ar4MlliAEdT8jkrYsljBm9QMPOg>

Dankegojn ankaŭ al Liba Gabalda, kiu sendis al mi raportojn kaj fotojn pri someraj aranĝoj, kiuj okazis en Koreio :

- la 50-a ILEI-Kongreso, en Busan, de la 15-a ĝis la 22-a de julio

- la 102-a Universala Kongreso, en Seulo, de la 22-a ĝis la 29-a de julio

- la 90-a SAT-Kongreso, en Gimpo, de la 29-a de julio ĝis la 7-a de aŭgusto

Se vi ŝatus viavice vidi la fotojn kaj legi la raportojn, petu tion de mi. Mi retmesaĝe sendos ilin.



A noter sur votre agenda

dans notre fédération

novembre 18-19 - Le Beausset : fin de semaine culturelle (*bulletin d'adhésion joint à ce n° d'octobre*)

2018 - février 24 / mars 3 - Les Issambres
Mediterranea Esperanto-Semajno
(*bulletin d'adhésion joint à ce n° d'octobre*)

2018 - printemps - Marseille : le Forum des Langues du Monde, annoncé dans le n° 109 pour le 1er octobre 2017, est reporté au printemps de l'an prochain.
(*à confirmer*)

en France

octobre 23-27 - Bouresse (86) - Kvinpetalo : stage de traduction animé par Brian Moon. Parallèlement, Stano Marček, venu de Slovaquie, animera un cours pour faux débutants ou plus avancés.
infos : informoj@kvinpetalo.org / tel : 05 49 03 43 14
<http://www.kvinpetalo.org/>

octobre 25-29 - Baugé (49) - Grésillon : Rencontre chorale d'Interkant', avec Zdravka Lenepveu
infos : kastelo@gresillon.org / tel : 02 41 89 10 34
<http://www.gresillon.org>

octobre 27 / novembre 4 - Baugé (49) - Grésillon : cours à 3 niveaux, traduction, chant choral, promenade dans notre forêt ou sur la voie verte.
Programme spécial pour les enfants avec fabrication de décorations pour Halloween.
infos : kastelo@gresillon.org / tel : 02 41 89 10 34
<http://www.gresillon.org>

en Europe

novembre 3-5 - Hombourg (Allemagne) : 71-ème week-end culturel.
<https://www.facebook.com/KulturaSemajnfino/>

décembre 8-10 - Herzberg-am-Harz (Allemagne) : 80-ème Session d'étude de GEA et traditionnelle fête de Zamenhof.
<http://esperanto-urbo.de/page.php?pid=24837007>

décembre 27 / janvier 3 - Sarrebrück (Allemagne) : 16-ème Rencontre du nouvel an.
<https://www.facebook.com/events/243634139464188/>

